Jaro III/VII. 4 N-o (28) Januar 1926

Sennacieca Revuo

Monata Organo
de Sennacieca Asocio Tutmonda

Fondita en 1919

Literaturo - Scienco - Pedagogio

ENHAVO:

Gulistan: Persa rakonto. Trad. Prof. *L. Ĵirkov.* — *V. Ŝiŝkov:* La speguleto. Trad. *P. Kazanski.* — *Multatuli:* La historio de Saidjah kaj Adinda. Trad. *G. P. de Bruin.* — *Mark Starr:* Kial kaj kiel britoj venkis Hindion. — *Maĥmud:* Avaria kanto. Trad. Prof. *L. Ĵirkov.* — Prof. *L. Ĵirkov:* Iom pri avaria kanto. — *Gregoro Rozenblat:* Oriento el la alto de aeroplana flugo. — Balado pri Lenin kaj Li Ĉan. Trad. *Sutkovoj.* — *Vl. Kuzmiĉ:* Du el grandioza Mondpatrio. — *Janase Masumu:* Mortigatoj por homaro. Vers. Trad. *R. O. R.* — *Haĵime:* Mallevu la standardon! Trad. *R. O. R.* — *M. Apletin* kaj *G. Tanin:* La japana lernejo.

Redakcio: 1-a Tverskaja-Jamskaja, 35, kv. 5, Moskvo I (USSR)
Administracio: Rich. Lerchner, Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz (Germ.)

REDAKCIA ANGULO

Oriento.... mistera por eŭropanoj landaro... De la infana aĝo en niaj kapoj dormetas la bildoj ekzotikaj, nin dorlotas la orientaj belaĵoj, en ni vivas la bildoj de Kipling'aj "Ĝangaloj", en niaj oreloj sonas la kantoj pri hindiaj perloj kaj diamantoj.

Certe, vi plezure legus pri oriento, en ĝia ekzotiko vi serĉus ripozon.

Vi komencas per persa rakonto. Kaj jam en ĝi, verkita preskaŭ miljaron antaŭe, vi renkontas suferon de ekspluatatoj. En rakonto de V. Ŝiŝkov vi renkontas trompagadon de eŭropano rilate al siberia indiĝeno. Nederlanda Hindio — indiĝenoj suferas, eŭropanoj aperas en la rolo de ekspluatistoj. Brita Hindio — la samaj bildoj.

Inter montaj valoj de kaŭkazio. Ni kutimis aŭdi pri kaŭkazaj gentoj, kiel pri sovaĝuloj; "Avaria kanto" estas ke meze de tiu sovaĝo floras vera poezio; kaj ree, Eŭropo sin enmiksas, ĝi tiras la indiĝenon, sian venkitan kolonianon, batali sur karpataj montoj por la negocaj interesoj de eŭropano.

Kion travivis *Maĥmud,* tion travivis multaj aliaj indiĝenoj de imperiismaj kolonioj, kiam ili estis pelitaj sur la eŭropajn batalkampojn.

La tuta ekzotiko de l' Oriento estas sangoplena.

Ĉu kulpas do k-do Kuzmiĉ, se lia rakonto ankaŭ spiras per sango? Ĉu venas al ni nun el Ĉinio iuj novaĵoj, krom la prisangaj?

Ne, ebie k-do Kuzmiĉ ne eraras — batalo blovas el Oriento, Oriento spiras per batalo akra; kaj ju pli orienten ni sekvas — tra la duonkolonio de Eŭropo, Ĉinio, al imperiisma Japanio — des pli klare aperas ĝia klasa karaktero. En la japanaj poeziaĵoj, en la japana desegnaĵo jam forta estas la spiro de la klasbatalo. Per la skizo pri japana lernejo ni povas observi jam plene disvolvitan tipon de klasa lernejo, kaj kun ĝi — plene disvolvitan kapitalisman regadsistemon.

Ĉu do post tralego ĉe vi ne aperas plenklare la kolonia problemo, ligita kun la tuta frenezo de la imperiisma mondregado?

Multaj estos malkontentaj pri tia orienta kajero. Precipe ili, kiuj predikas neŭtralecon. La redaktantoj ne kulpas: neniu linio apartenas al ili — la numeron kreis nia kunlaborantaro, nia juna kolektivo.


Akuzu ĝin, ke nur suferojn ĝi povis trovi en la oriento, ke neniu ero da ĝojo estas trovita en la orienta ekzotiko!

Akuzu, Sinjoroj kaj Sinjorantoj, sed pripensu, kiu fakte kulpas. Ĉu kulpas nia klaso, la laborula, ke nur suferojn ĝi trovas ĉirkaŭ si?

Kaj se ni havas iun ĝojon — ĝi estas la ĝojo de batalo proliberecа, la ĝojo de libera laboro — la ĝojo de unuamaja festo. Ni klopodos por montri ĝin — niaj kunlaborantoj jam klopodas super la maja kajero, ĉu ne, kamaradoj?

El ĉiuj landoj, el ĉiuj suferejoj ni atendas materialon por nia unuamaja kajero.

Neniu el vi tion forgesu. Ĉiu faru sian eblon. *La Redakcio.*



PERSA RAKONTO

(*GULISTAN,* LIBRO III, RAKONTO 23)

Iam mi konis komerciston, kiu havis cent-kvindek kamelojn por transporti varojn, kaj kvardek sklavojn kaj servistojn. Iunokte, en la insulo Kiŝ¹), li alvokis min en sian ĉambron. Dum la tuta nokto li estis maltrankvila kaj ĉiam parolis vantajn parolojn: "Tia varejo en Turkestan, kaj tia varo en Hindostan, kaj tia papero estas la aĉetkontrakto pri tia terpeco, kaj jen garantiaĵo pro tia valoro". Iufoje li diris: "Mi intencas veturi al Iskenderie'n²), ĉar estas milda ĝia aero" — kaj iufoje: "Ne! ĉar estas ondplena Okcidenta Maro". Ree li diris: "Ho, Saadi! alia vojaĝo okazos, kaj, se mi plenumos ĝin, mi travivos la reston de mia vivo, sidante en mia anguleto, kaj tute forlasos komercajn aferojn". Mi demandis: "Kien estos tia vojaĝo?" Li respondis: "Mi deziras transporti sulfuron el Persujo en Ĥinujon, — mi aŭdis, ke tie estas alta ĝia prezo; kaj el tie mi transportos ĥinan porcelanon en Rum'on³); kaj orŝtofojn de Rum — en Hindujon; kaj hindajn ŝtalaĵojn en Halab'on⁴); kaj vitraĵojn kaj spegulojn de Halab — en Jemen'on; kaj jemenajn teksaĵojn — en Persujon; kaj tiam mi forlasos komercajn vojaĝojn kaj sidos por ĉiam en mia vendejo".

Li tiom paroladis pri tiaj melankoliaĵoj, ke fine li perdis la parolpovon. Tiam li diris: "Ho, Saadi! vi ankaŭ diru parolon pri io, kion vi vidis kaj aŭdis". Kaj mi diris:

"Ĉu vi aŭdas? — jen dumvoje tra l' dezerto vasta Ghur[5]*),*
Laca, el kamelo falis homo, kiun sendis vi...
Diris: "kio do satigos la okulojn de l' riĉul'?"
Kaj respondis: "aŭ nenio, aŭ la humo de tombej'!..."

Tradukis el la persa lingvo Prof. *L. Ĵirkov.*

Postnoto. *Saadi,* unu el la plej famaj persaj poetoj, vivis samtempe de la krucaj militiroj (nask. 1184, mort. 1291). Dumvive li multe vojaĝis, vizitis landojn

---

¹) En Persa Golfo. ²) Aleksandrio, la urbo en Egiptio. ³) La orienta nomo de Bizantio. ⁴) La urbo en Sirio (Alepo). ⁵) Regiono, proksime de la limoj de Hindujo.

orientajn kaj okcidentajn, iutempe eĉ estis militkaptito de la kristanoj. Krom la versaĵoj, li verkis ankaŭ malgrandan prozan libron — *Gulistan* (Rozĝardeno), la aro de mallongaj rakontoj, el kiuj ni ofte povas ĉerpi faktojn de lia biografio. *Gulistan* estis la unua verko de la persa literaturo, kiu fariĝis konata en Eŭropo, kaj jam delonge aperis ĝiaj tradukoj. En Oriento ĝi estas ĝis nun la unua komenca lerneja legolibro.

Dank' al la logikeco, kiun posedas la strukturo de artefarita lingvo, la supra esperanta traduko povis esti farita pli laŭvorte, ol iu ajn alia naturlingva traduko. Vorto post vorto, kaj ideo post ideo, povas reprezenti en Esperanto, en plena precizeco, la veran esprimmanieron de la orienta lingvo. Tion ĉi permesas fari neniu el lingvoj naturaj. *Prof. L. Ĵirkov.*

LA SPEGULETO

U. Ŝiŝkov

La speguleto estas ordinara speguleto. Estas ĝi malgranda, ronda, valoras ĝi kvin kopekojn.

La komercisto ĉirkaŭ dekduon da ili enveturigis al la stepo.

La komercisto pensas:

— Bezone estas ilin al Kalmukoj vendi, bezone estas Kalmukojn malprofitigi. Peko en tio ne estas: Kalmuko estas ne homo, sed besto, kaj la animo lia estas, kiel ĉe hundo, — vaporo. Besto, ordinara besto.

Veturas la komercisto por gasti al sia amiko, kalmuko Argamajo, kiun li ne unufoje trompadis.

Vespere li alveturis al la fajreto. Argamajo en jurto[1]) sidas, — dika, forta. Sola li apud la fajreto sidas, ŝafan oston mordetas kaj murmuras kanton pri tio, kiel li morgaŭ ĉe matenruĝo ekvagos al neĝoj, kie estas tiaj bongustaj kaj sukoplenaj herboj — dolĉaĵo por brutaro.

— *Ezénj!* — salutis la komercisto.

— *Ezenj, ezenj!* — respondis Argamajo, enrigardante la alveninton. A—a—a... Jen kiu estas! Amiko!... — ĝoje ekkriis li kaj cedis al la gasto sian lokon.

Ĉe la fajro li ekklopodis, — la fajro pli hele ekbrulis, — duonŝafon li metis en la kaldronon, teon kalmukmaniere prepari li komencis: kun lakto, rostita hordeo kaj salo.

— La virinoj forestas... Unu malsana estas, la dua por gasti forveturis, al sia patro.

— Ĉu vi havas *arak*'eton[2])?

— *Bar, bar...* — kaj li transdonis al la komercisto en betulŝela siteleto hejmepreparitan el lakto brandon.

---

[1]) Jurto — tipo de ronda tendo, en kiu loĝas aziaj nomadoj.
[2]) *Arak* — kalmuka brando, hejmepreparata el lakto.

Sidas ili, konversacias. La fajreto gaje brulas. *Arak'*eto estas bongusta, varma, tra la sango ĝi ekpromenis, en la cerbon ekfrapis, liberecon donis al la lango.

La kalmuko ridas kaj la komercisto ridas, je ŝultro de Argamajo li frapetas, flatajn vortojn parolas!

— Neniu tiajn bonajn ĉevalojn havas, kiel vi. La plej bonajn bovojn vi havas. La plej grasajn ŝafojn vi havas. Riĉa vi estas. Edzinon vi belan havas.

Parolas li, *arak'*eton drinkas, ŝafaĵon manĝas.

Al Agramajo agrable estas, aŭskultas li, ridas kaj, por ne resti ŝulda, parolas al la gasto:

— Vi la plej bona estas ... la plej fidela ... amiko ...

Rememoris la komercisto pri la speguleto. Pensas li:

— Necese estas ĝin donaci ... Malprofito estos malgranda ... kvin kopekojn.

Elprenis li ĝin, montras:

— Prenu do, ekrigardu vin.

Rigardas la Kalmuko fikse. Alforĝis lin al si la speguleto.

— Kiu estas?

— Ja vi estas tio! ...

— Kiel mi estas? Diablo tio estas! ...

Estas vi ...

Silentas la Kalmuko, pli fikse enrigardas, malfideme al la komercisto sin turnas, parolas al li:

— Kion vi mensogas?! ... Ne! ... Felvesto estas mia, sed la vizaĝaĉon de naskiĝo mi ne vidis, ne konas ĝin! ...

La komercisto feliĉece ridetas, sed la Kalmuko pro senpacienco ekmoviĝis sur la felto, la manoj tremas, forte ili estas kaptintaj la sorĉan vitron.

— Surmetu vi la ĉapon ... Ĉu vi vidas? ... Vi ja estas!

Rigardas la Kalmuko, — lia estas la ĉapo en la spegulo; la harligon li rigardas, — lia estas la harligo, kun la rubandeto; veruko sur lia nazo estas, — ekpalpis li ĝin.

— Ĥa— ĥa— ĥa! ... Vendu! ... Faru la favoron, vendu! ...

La komercisto tute mildiĝis, ĝojigi sian amikon li volas, diras li:

— Sed mi ĝin al vi ...

— Faru la favoron, vendu! ... Kiom ajn vi volus, prenu! ...

Kaj subite la komercista animo al kavaĵo ekrulis ...

— Neeble estas ... — per iom tremanta voĉo diris la komercisto.

— Prenu vi bovon ... Al la gefiloj, al la virinoj mi montros ... Ridu ili la vizaĝaĉojn!

— Ne, neeble estas ... — firme la komercisto diris kaj malfortete la speguleton al si li tiras.

Argamajo ne redonas:

— Du bovojn, tri bovojn! ... bonajn!

La animo komercista en la kavaĵon falegis, ekbaraktis ĝi en la nigra fluidaĵo.

— Kion vi parolas! mi mem pli multe pagis... En Moskvo mi ĝin akiris... Ĉu vi konas, ĉu vi aŭdis?

Apenaŭ sin detenas de ploro Argamajo, la granda infano.

— Prenu kvar bovojn... Bonvolu preni, amiko!...

— Iru ni por kapti la bovojn, — avide diris la komercisto.

Argamajo ridas ruze, la speguleton zorge kaŝas, al la komercisto timeme li rigardas: ĉu ne tro malkare li vendis? Ne reprenu li...

— Karese al li parolas la Kalmuko per la delikata sia voĉo:

— Vi la plej bona estas, la plej fidela... amiko...

Malfrue nokte estis revenanta en sian loĝejon la ebria komercisto. Kaj, farante en la selo per sia ebriiĝinta korpo zigzagojn, gaje li voĉpensis:

— Li por tio ja Kalmuko estas, ke lin oni instruu... Por tio li ja estas tatara vizaĝaĉo...

El rusa lingvo tradukis *P. Kazanski.*

LA HISTORIO DE SAIDJAH KAJ ADINDA[1]

MULTATULI

La patro de Saidjah havis bubalon, per kiu li prilaboris sian kampon. Kiam tiu ĉi bubalo estis de li forprenita de la distriktestro de Parang Kudjang, li estis tre malĝoja kaj ne parolis unu vorton dum multaj tagoj. Ĉar la tempo de plugado estis proksima, kaj estis timende, ke, se oni ne sufiĉe frue prilaboras la *sawah*[2]), ankaŭ la tempo de semado pasus kaj fine ke ne estus *padie*[3]) por tranĉi kaj meti en la *lombong*[4]) de la domo.

La patro de Saidjah nun estis tre malĝoja. Li timis, ke ne estus rizo, kiun bezonus lia edzino kaj Saidjah, kiu estas ankoraŭ malgranda, kaj la gefratetoj de Saidjah. Ankaŭ denuncus lin la distriktestro ĉe la *assistent-resident*[5]), kiam li malfruus je la pagado de la grundrentoj. Ĉar tio estis punebla laŭ la leĝo.

Tiam prenis la patro de Saidjah ponardon, kiu estis heredaĵo de lia patro. La ponardo ne estis tre bela, sed estis arĝentaj ringetoj ĉirkaŭ la ingo kaj ankaŭ sur la pinto de la ingo estis peceto de ar-

---

[1]) Fragmenteto el konata verko "Max Havelaar" de Multatuli. Legu pri ĉi tiu verkisto nian artikolon en "S. R.", paĝo 161, 1924/25.

[2]) *sawah* = rizkampo. [3]) *padie* = nesenŝeligita rizo.

[4]) *lompong* = ejo por enmeti rizon kaj *padie*'on.

[5]) *assistent-resident* = registara oficisto.

ĝento. Li vendis ĉi tiun ponardon al Ĉino, kiu loĝis en la ĉefloko kaj venis hejmen kun dudek kvar guldenoj, per kiu mono li aĉetis novan bubalon. . . . .

Saidjah havis jam naŭ jarojn kaj Adinda, najbara knabino kun kiu li poste edziĝus, jam ses jarojn, antaŭ ol ĉi tiu bubalo estis forprenita ĉe la patro de Saidjah de la distriktestro de Parang Kudjang. La patro de Saidjah, kiu estis tre malriĉa, vendis nun al la Ĉino du arĝentajn kurtenhokojn, heredaĵojn de la gepatroj de lia edzino, por dek ok guldenoj. Kaj per tiu ĉi mono li aĉetis novan bubalon. . . . . .

Kiam tiu ĉi bubalo estis forprenita de la patro de Saidjah kaj buĉita — mi diris al vi, leganto, ke mia historio estos unutona — estis Saidjah dekdujara. . . . . .

Kelkan tempon poste, la patro de Saidjah fugis el la lando. Ĉar li timis pri la puno, kiam li ne pagus siajn grundrentojn, ĉar li ne plu havis heredaĵojn por aĉeti novan bubalon, ĉar liaj gepatroj ĉiam loĝis en Parang Kundjang kaj do malmulton estis postlasintaj al li. Ankaŭ la gepatroj de lia edzino loĝis ĉiam en la sama distrikto. Post la perdo de sia lasta bubalo, li ankoraŭ kelkan tempon daŭrigis sian laboron per dungitaj plugbestoj. Sed ĉi tio estas maldanka laboro kaj krome tre ĉagrena por iu, kiu antaŭe mem posedis bubalojn. La patrino de Saidjah mortis pro ĉagreno kaj la patro en senkuraĝa momento forkuris el Lebak kaj el Bantam por serĉi laboron en la Buitenzorga lando. Li estis punata per bastonbatoj, ĉar li estis foririnta el Lebak sen pasporto kaj la polico realportis lin al Lebak. Tie ĉi oni ĵetis lin en la malliberejon ĉar oni rigardis lin freneza, kio ne estu estinta io malebla, kaj ĉar oni timis, ke li en momento de *matah-glab* [1]) eble farus *amokh* [2]) aŭ aliajn misaĵojn. Sed li ne estis longe kaptita, ĉar mallongan tempon poste li mortis.

Kio okazis al la gefratetoj de Saidjah, mi ne scias. La dometo, kiun ili loĝis, staris kelkan tempon neloĝata kaj baldaŭ ĝi disfalis, ĉar ĝi estis nur konstruita el bambuo [3]) kaj kovrita per *atap* [4]). Iom da polvo kaj malpuraĵo kovris la lokon, kie estis multe suferate. Estas multe da tiaj lokoj en Lebak. — — — — — — — —
— — — — — — — — — — — — — —

Saidjah estis jam dekkvinjara, kiam lia patro foriris al Buitenzorgo. Li ne estis akompaninta la patron tien, ĉar li havis pli grandajn intencojn. Li iris al Batavia, kie li gajnus monon. Kaj kiam li revenus li estus sufiĉe aĝa por edziĝi kun Adinda kaj li havus monon por du bubaloj ! — — — — — — — — — — — —
— — — — — — — — — — — — — —

---

[1]) *matah-glap* = speco de rabio. [2]) fari *amokh* = esti en stato de rabio.
[3]) bambuo = speco de kano.
[4]) *atap*-folioj de speco de akvopalmo, uzataj kiel tegmenta kovraĵo.

Kaj la virinoj de Badur venis el siaj domoj kaj rigardis kunsente la kompatindan Saidjah, ĉar ili rekonis lin kaj komprenis, ke li serĉas la domon de Adinda kaj ili sciis, ke ne plu estis domo de Adinda en Badur.

Ĉar, kiam la distriktestro de Parang Kudjang estis forpreninta la bubalon de la patro de Adinda — mi diris, leganto, ke mia historio estas unutona — . . . tiam estis la patrino de Adinda mortinta pro ĉagreno. Kaj ŝia plej juna fratineto estis mortinta, ĉar ŝi ne plu havas patrinon, kiu mamnutras ŝin. Kaj la patro de Adinda timis pri la puno, kiam li ne pagus la grundrentojn. . . . .

Jes, mi scias, jes, mi scias, ke mia rakonto estas unutona!

. . . La patro de Adinda estis foririnta el la lando. Li estis kunpreninta Adinda kaj ŝiajn fratojn. Sed li estis eksciinta, kiel la patro de Saidjah estis punita per bastonbatoj, ĉar li estis irinta el Badur sen pasporto. Tial li estis irinta al Tjilang-kahan, la distrikto de Lebak, kiu limas je la maro. Tie li estis kaŝinta sin en la arbaroj kaj atendinta la venon de Pa-ento, Pa-Lontah, Si Uniah, Pa-Ansiu, Abdul-Isma kaj ankoraŭ kelkaj aliaj de kiuj de la distriktestro de Parang-Kudjang estis forprenita la bubaloj, kaj kiuj timis la punon, se ili ne pagus la grundrentojn. Ili estis rabintaj fiŝkaptistboaton kaj veturintaj al la *lampongs*[1]) de Tana-itam. Tion oni almenaŭ flustre diris en Lebak, kiam oni parolis pri oficiala bubalrabado kaj nepagitaj grundrentoj.

— — — — — — — — — — — — — — —

Tiam aĉetis Saidjah boaton kaj venis per tiu post kelktaga velveturado en la *lampongs,* kie la ribelantoj rezistis la nederlandan aŭtoritaton. Li aliĝis al bando da Batamanoj, malpli por batali, ol por serĉi Adinda. Ĉar li estis dolĉkaraktera kaj pli sentema por malĝojeco ol por maldolĉeco.

Je iu tago, kiam la ribelantoj ree estis venkitaj, li ĉirkaŭvagis en vilaĝo, kiu estis ĵus konkerita de la nederlanda armeo kaj do estis brulanta. Saidjah sciis, ke la bando, kiu tie estis neniigita, plejparte konsistis el Bantamanoj. Kiel fantomo li vagis tra la domoj, kiuj ankoraŭ ne estis tute forbruliĝintaj kaj trovis la kadavron de la patro de Adinda kun klevangbajonetvundo[2]) en la brusto. Apud li vidis Saidjah la tri mortigitajn fratojn de Adinda, junulojn, preskaŭ infanojn ankoraŭ, kaj iom pli malproksime kuŝis la kadavro de Adinda, nuda, terure difektita.

Malgranda strio da blua tolo estis eniĝinta en la larĝa brustvundo, kiu ŝajne estis finiginta longan luktadon . . .

Tiam kuris Saidjah renkonte al kelkaj soldatoj, kiuj kun mantenitaj pafiloj enpelis ankoraŭ vivantajn ribelantojn en la fajron de la brul-

---

[1]) *lampongs de Tanu-itam* vilaĝoj en kiuj la indiĝenoj ribelas kontraŭ nederlanda aŭtoritato.

[2]) *klewang* = speco de glavo.

antaj domoj. Li ĉirkaŭprenis la larĝajn glavobajonetojn, premis sin antaŭen kun forto kaj ankoraŭ retropuŝis la soldatojn per lasta fortostreĉo, kiam la teniloj premis kontraŭ lia brusto.

Kelkan tempon poste estis en Batavia granda ĝojkriado pri nova venko, kiu estis aldonintaj tiom da novaj laŭroj al la laŭroj de la nederland-india armeo. Kaj la reganto de Indio skribis Nederlanden ke la trankvilo en la *lampongs* estis restarigita. Kaj la reĝo, informita de siaj ŝtatservistoj, ree rekompencis tiom da herokuraĝo per multaj ordenkrucoj.

Kaj verŝajne dum dimanĉpreĝadoj aŭ preĝoservoj supreniris el la koroj de la piuloj dankopreĝoj ĉielen, kiam oni eksciis, ke la "Sinjoro de l'armeoj"[1]) ree estis kunbatalinta sub la standardo de Nederlando.

Sed, Dio, kompatanta pri tiom da sufero
ne akceptis la oferojn de tiu tago.,

Mallongigite trad. el holanda lingvo.

---

[1]) Sinjoro de l'armeo — dio.



KIAL KAJ KIEL BRITOJ VENKIS HINDION

MARK STARR

Sir W. Joynson Hicks (mondfamaĉa pro persekuto kontraŭ K. P.-anoj malkaŝe klarigis la kialon de la almilito de Hindio en sia parolado, citita en "Daily News" (17. X. 1925):

"Ni ne venkis Hindion por la profito de la hindoj. Mi scias, ke ĉe kristanmisiaj kunvenoj oni diras, ke la britoj venkis Hindion por pli altigi la vivmanieron de hindoj. Tio estas hipokritaĵo. Ni venkis ĝin por havi vendejon por la varoj britaj. Ni venkis Hindion per la glavoj kaj per la glavoj ni posedas ĝin. (Interrompa krio: "Honto!") Nomu ĝin honto, se vi volas. Mi pridiras faktojn. Interesas min la misia laboro kaj por ĝi mi mem laboras multe. Sed mi ne estas hipokritulo tiomgrade, kiomgrade la persono kiu diras, ke ni regas Hindion por la Hindoj. Ni tenadas tiun landon kiel bona elirejo por varoj britaj ĝenerale kaj por katunvaroj el Lankaŝiro (industria distrikto brita) speciale."

Alia ĉefulo kaj reakciulo brita, Lord Berkenhead, en sia parolado en aŭgusto 1925, parolis alion, nome, ke la britoj iris al Hindio por trankviligi per la glavo interrasajn kaj intersektajn malpacojn kiuj aliel estus detruintaj tute la hindian civilizon. Se la britoj forlasus tiun landon, laŭ li, denove la anarĥio ekregus. Sed la faktoj neas tiun aserton. Ĉiam la brita registaro ekspluatis la dividojn inter hindoj kaj mahometanoj kaj profitis el ili. Nenie la devizo "Dividu por venki" tiel sukcese aplikiĝis.

La metodoj de la venko kaj ekspluato estas preskaŭ nekredeble terurigaj. Jen citaĵo el la ortodoksa "Historio de Anglio" (Cassel' s):

"Dum la jaro 1770, sub la administrado de S-ro Carter, okazis en Bengalo (provinco de Hindio) malabundo de nutraĵoj. Tiel terura estis ĝi, ke laŭdire unu triono de la tuta loĝantaro de tiu ŝtato mortis kaj nepriskribeblaj teruraĵoj okazis. La plej naŭza cirkonstanco estis tiu, ke angloj estis aŭtoroj de tiu ĉi afero: ili akaparis rizon kaj tiamaniere devigis la indiĝenojn aĉeti ĝin je prezoj troegaj. Dum la antaŭa aŭtuno estis senpluveco; la angloj plenprofitis ĝin kaj aĉetis la tutan rizon aĉeteblan por poste profitegi el ĝia vendo". Macaulay penas defendi la anglojn en tiu ĉi okazo, sed lin kontraŭas la tuta forto de atestoj kaj liaj plej bonaj penoj ne povas ŝanĝi nigron en blankon.

Alia aŭtoro, priskribante la impostadon, diras: "Mono venis tiamaniere nur per gutoj. Ĝi ne povas estingi la soifon de tiuj personoj, kiuj atendis

por ricevi ĝin. Necesis serĉi rimedon por plirapidigi la alvenon de mono. La indiĝenoj povis vivi kun malmulta salo, sed ili ne povas malsati je ĉefa nutraĵo. Kelkaj el anglaj agentoj havis oportunan pozicion por kolekti rizon kaj konservi ĝin en grandaj kvantoj. Ili faris tion, ĉar ili sciis, ke la indiĝenoj prefere mortos ol rompos la principojn de sia religio per manĝado de viando. Por la indiĝenoj restis do la elekto: aŭ morti, aŭ pagi per ĉio, kion ili posedis. La indiĝenoj komencis morti. Ili kulturis la teron kaj nun vidis la rikolton je dispono de aliaj. La malsatado en kelkaj lokoj estis tiom granda, ke la vivantoj ne povis enterigi la korpojn de mortintoj kaj tiuj restis surtere“.

“Historio de la proceso kontraŭ Warren Hastings“ de J. S. Mill citas jenan paroladon de S-ro Patterson:

“La malriĉaj terkulturistoj estis traktataj tiel malbonmaniere, ke oni ne povus kredi tion, se tio ne estus atestita en la kronikoj de la Orienta Hinda Kompanio; kaj S-ro Burke opiniis, ke necesas apologii al iliaj lordmoŝtoj (la juĝantoj ĉe la proceso de Hastings) pro la abomena priskribo, kiun li devis rakonti kaj kiu korŝirus iliajn sentojn. La greno kaj la bovoj de la terkulturistoj estis venditaj por unu triono de sia valoro; iliaj kabanoj estis forbruligitaj. La malfeliĉaj posedantoj devis pruntepreni ĉe procentegistoj por povi pagi siajn obligaciojn, kiuj maljuste kaj kontraŭleĝe estis prenitaj de ili dum ilia mallibereco. Kaj la infera diablo Deby, aŭ Devi Sing, estis tiom firma en la postulo pagi la obligaciojn, ke la mizeraj kamparanoj estis devigitaj pruntepreni ne po 20, 30 aŭ 40, sed po 600 procentoj por satigi lin. Kiuj ne povis kolekti monon, tiuj estis torturataj plej kruele. Ĉirkaŭ iliaj fingroj estis streĉataj ŝnuroj ĝis la momento, kiam la karno de la kvar fingroj ĉiumane fariĝis fakte unu solida amaso. La fingroj tiam estis redisigataj per puŝataj inter ilin feraj kaj lignaj kojnoj. Aliaj homoj estis po duope kunligataj ĉe la piedo kaj metataj trans lignan stangon, de kiu ili pendis piedesupren. Tiam ili estis batataj sur la plandojn ĝis kiam defalis la ungoj. Poste ili estis skurĝataj per bambuaj kanoj kaj per pikaj arbetoj kaj, super ĉio per kelkaj venenaj herbaĉoj, kiuj estis kaŭstikaj kaj bruligis ĉiutuŝe.“

Jena do estas la aktualaĵo de la venko, la reala bazo forgesita de Kipling kaj de la aliaj, kiuj fanfaronas pri la supera kulturo de la Brita Imperio.

AVARIA KANTO

MAĤMUD

Mian sopiron de l' koro konfuzita ĉu ci prenos, ho nubo ĉiela?
Plendo estas skribita pri la turmentoj de mia korpo tremanta. Ĉu ci portos ĝin, ho nubo fluganta?
Kiel suferis spirito en mia korpo, rakontu laŭvere, ho vento el Sirio! Kiel bruegas fajrego, kiel ĝi plenumas la bruston, — pri tio mian leteron, ho suno, lumanta ŝtonegojn, portu en ŝiajn manetojn!
Diru al ŝi, ho kaprino de l' montoj de Cor[1]), de l' montoj glaciaj eĉ dumsomere, ke mi estas ĉi tie, meze de neĝoj ...

1) Cor — la plej suda transmontaro parto de Avario.

Rakontu al ŝi, ho cervo kun oraj kornoj, kiu vivas en intermontoj plenaj je ŝtonoj, kien aliaj bestoj ne iras, — rakontu, ke mi estas ĉi tie en militiro, en arbaroj, kie oni ne dormas surlite...

Eble vi sonĝas pri mia nigra brovo, pri miaj nigraj okuloj?...

Mi estas sur montoj, kie oni ne trovas vilaĝojn. Sed eble mi aperas antaŭ vi kun flava *testar*[2])?...

Skribi leterojn al vi? Estas plena je ili nia poŝtejo, sed kiu ilin ricevos?

Ĉiam, dum estas subironta la suno, mi petas bestojn sovaĝajn pri sciigoj, dirontaj pri vi. Mi ĉiam iradis sur viaj paŝoj, pro tio hontigis min la popolo, — hodiaŭ, mi ĉien iradis kaj serĉas, kie mi mortos?...

Kio okazis, ke subite rompiĝis sciigoj? Oni iras la straton, — kaj forestas letero... Neniam mi fermis miajn okulojn, post kiam mi estis irinta militon, post kiam mi vin adiaŭis! Ĉiuvespere mi kontraŭstaras ekdormon: ĉu mi povus ekdormi, ne atinginte mian amatinon?

La besto sovaĝa, kiu inter ŝtonegoj perdis la vojon, aŭ serĉas la vojon, aŭ renkontas la morton... Kiam finiĝis la vintro, kiam alvenas la printempo, ho perdriko de sur montetoj, — aŭ mi vin premos, aŭ mi starigos la ŝtonon surtomban!... —

Caroj kaj reĝoj okazigis la militon; ili klopodas, kunigas siajn popolojn...

Kaj mi ne havas penson krom: kiam mi mortos? — kaj mi ne petas pri helpo iun ajn krom vin!

Ho, alvenu la horo, kiam mi turnos mian rigardon al vi!... Ho, ke ĝi venu! Ĝi nin varmigos, kaj la vintro estiĝos somero!... Se estos plenumita mia espero, kaj se mi ne mortos, vin ne vidinte, — la mondo ne povos fariĝi malhela, eĉ se la suno malaperos!...

Spite de ĉio mi volas ekvidi vian vizaĝon, de l' suno netuŝitan en lulilo! Mi volas aŭskulti, aŭskulti senfine, vian langon esprimplenan, kiu jam estis klera kaj jam instruita, kiam ĝi suĉis ankoraŭ mampintojn!

Ho, la selo tedas min, kaj abomena estas nun mia ĉevalo! Mi vin alvokis, alvokis vin multfoje, kaj jen — forlasis mian korpon la spirito . . . Ho, tedas min mia pafilo, — ho, mi forĵetis la armilojn, kiam al vi adiaŭis, ho lumo de miaj okuloj! Kontraŭ kiu mi batalus, ho fraŭlino harmonia? La lando, kie vi forestas, — tiu lando estas por mi ne tera lando, sed infero! Sed tie, kie supreniras vi sur la tegmenton, kie marŝas vi sur piedvojeto, — tie ĉu ne estas la paradizo de la bonkredantoj?

Ne ekzistas gubernio de Rusio, tra kiu mi ne estas vojaĝinta, pri vi revanta ĉiam!

Ho, ke mi trovu la portreton, al vi similan! Mi malfermus mian bruston, mi ekprenus mian koron, kaj mi ĝin donus pro tiu portreto!...

Jen, en ĉiuj bazaroj blankkoloraj, en ĉiuj magazenoj kaj vendejoj de hebreoj, mi rigardas la surskribojn kaj surbildojn, algluitajn sur la varoj. Meze de la urbaj mirindaĵoj, en teatroj, sur muroj, — mi preterlasis neniun portreton sen alklinigi min al ĝi . . . Sed aŭ mi estas malkapabla, aŭ la ĉaso estas nun sen ŝancoj, — ĉu pvoas tie ĉi aperi la amikino, kiun mi forlasis hejme? Ĉu estas stulta la pasio, aŭ malsaĝa mia amo, — sed... ĉu en la tago malespera vi komprenos mian revon?

---

2) TESTÀR — turbano (persa vorto).

Por ne doni konfuzon al la popolo, ŝi neniam iras la stratojn, — kiel do estus eble fari ŝian portreton? Por ne esti ensorĉita de iu okulo malbona, ŝi eliras nur Vendrede[3]) tagmeze... Mi fariĝis laca pro serĉado, kaj vagado tedas min. La tuta bazaro estas malplena! Rusio restas malproksime. Nun ni vivas en la urboj, kie aŭstrianoj similas al *Iblis*[4])...

Ne! en ĉiu domo oni povas vidi fotografaĵojn, kiuj estas al vi similaj! Vian grandecon, vian sintenadon, vian vizaĝon karan oni povas tuj ekkoni! Neebla estas la eraro — tio estas precize vi! Via harligo estas disvolvita, volviĝas viaj bukloj! — Kio do estas? — ho, mi malfeliĉa! — Ŝia vangkoloro kiel floro de la montoj... Mi perdas mian menson tuj, kiam mi ekrigardas...

Mi ne detenis min, komencis interparoladon:

— El kie estas tiu virino sur la fotografaĵo?

Oni respondis:

— Ŝi estas Mario, kiu sen edzo naskis la profeton!

La rideto en la okuloj kaj la brilo de l' vizaĝo,... ho, pardonema dio! — nenia diferenco. La skizo de l' okulo kaj la formo de la frunto,... se ĝi ekparolis, — tio estus tute vi, vi mem!

Rahman[5]) estas kreinta du similajn animojn. Sed kial estas surmetita alia vesto? En ili ĉio akordiĝas, iliaj vizaĝoj, iliaj buŝoj estas tiel similantaj... En unu vazo oni miksis kaj elverŝis la homan formon, por ke al ni aperu en ĝi kune Meko kaj *Kaabo*[6]) Meka...

Mi ne supozis, ke hodiaŭ estos la revido!

Kiel junaj abeloj, ankoraŭ ne gustumintaj florojn, ĝojas super la herbaĵo, — tiel mi, ferminta la okulojn, revas pri vi kaj venkas tiun, kiu ĉirkaŭbrakas vin kaj kiu premas vin al sia brusto...

La kristanoj, kiam preĝas antaŭ vi, frapas per la mano siajn fruntojn kaj siajn brustojn. La servantoj de la kruco servas al vi kaj bruligas lumingojn en ĉiuj kvar anguloj. Kaj mi, — mi staras inter ili, mi rigardas vin. Mi ĵetis signon per mia okulo, kvankam mi ne kliniĝis kaj ne preĝis...

Via bildo sur la muro estas senanima, sed mi glorigis ĝin!...

Sur la fervojo, apud la stacio, lokomotivoj brulas, suferas, senfortiĝas. Ili antaŭen paŝas, malantaŭen iras. La tuta mondo kontraŭstaras miajn volojn kaj dezirojn. De dio ĉio estas metita sur la homo[7])!

Nenio! Malatentu!...

Ho, jam delonge ne alvenis al ni leteroj! Jam delonge! Ke mi ne forgesu!

El avaria lingvo tradukis Prof. L. Jirkov.

---

3) Vendredo estas musulmana festotago.
4) IBLIS — diablo (araba vorto).
5) RAHMAN — unu el la arabaj nomoj de dio.
6) KAABO — antikva, ankoraŭ praislama sanktejo en Meko.
7) Aludo al la paroloj de Korano (33, 71), "vere, ni metis la kredon sur la ĉielo", kaj sur la teron, kaj sur la montojn, kaj ili rifuzis ĝin porti, kaj ili tremadis sub ĝi; kaj la homo ekportis ĝin . . ."

IOM PRI AVARIA KANTO

PROF. L. ĴIRKOV

La lingvo *avaria* estas unu el la plej ĉefaj naturaj interpopolaj lingvoj de nord-orienta Kaŭkazo. La loĝantaro, kiu parolas tiun lingvon, loĝas de la nordaj stepoj, tra la montaroj de Dagestan, ĝis la valo de Alazan, sude de la ĉefa kaŭkaza montĉeno. La najbaraj tre multenombraj, sed malpli grandaj popoletoj parolas ankaŭ la lingvon *avarian*, kiu servas por ili kiel ilo de interpopola komunikiĝo. La lingvo, interalie, prezentas al ni kelkajn rimarkintajn faktojn de plisimpliĝo, kiuj povas esti klarigitaj nur per ĝia interpopola rolo. La fonetiko de la lingvo estas tre stranga por la oreloj de eŭropano; ĝi enhavas multe da konsonantoj, elparolataj per la lango kontraŭ la plej malantaŭa parto de palato, kaj en la laringo; krom tio ekzistas kvar diversaj konsonantoj de la tipo *l*, sed mutaj (t. e. sen vibrado de kordoj de laringo). La *avarianoj* mem sin nomas simple *Ma'rul* (t. e. montaranoj).

Unuafoje barono P. K. Uslar en la 1870aj jaroj esploris atente tiun ĉi lingvon kaj verkis ĝian gramatikon, tre plenan, sed kiu nuntempe aperas jam tro arkaika je la nuna scienca vidpunkto. Laŭ la ordono de Moskva nord-kaŭkaza komitato mi vojaĝis en Avario en 1923, kaj studadis la lingvon, celante aldoni pluajn detalojn al la verko de Uslar kaj kolekti pluajn tekstajn materialojn. Post tiu vojaĝo aperis en Moskvo, en 1924, mia "Gramatiko de la lingvo *avaria*." La granda kolekto de *avariaj* kantoj (pli ol 40) atendas ankoraŭ la ŝancon por esti publikigita en originala teksto kaj traduko en iun ajn eŭropan lingvon.

La jenan kanton jam antaŭ delonge mi sendis en Dagestanon, kie ĝi estis aperonta en loka scienca artikolaro. Ĝis nun ĝi ne aperis, kaj pro malfavoraj cirkonstancoj de la tiama eldona entrepreno, — neniu scias, kiam ĝi aperos. Sekve, ĉi tie presata esperanta traduko prezentas la tradukon por eŭropanoj unuafoje.

Antaŭ la vojaĝo de 1923 neniu eĉ supozis, ke ekzistas en Avario konataj kaj famaj poetoj, talentplenaj tuŝantaj la temojn plej diversajn, — same kiel ekzistas poetoj ĉe iu ajn kultura nacio. Neniu eĉ supozis, ke la *avarianoj* scias skribi, ke ili kun plena takto estas reformintaj la araban alfabeton kaj farintaj ĝin taŭga por esprimi la sonojn, troveblajn nur en ilia lingvo. Neniu supozis ankaŭ, ke en iliaj vilaĝoj ni povas trovi literaturajn rondetojn, literaturan kritikon, diversajn poeziajn skolojn. Oni opiniis, ke tiu nacio posedas nenion, krom buŝa popola poezio.

La plej nova, la plej grava, kaj la plej interesplena poezia skolo en Avario estas la skolo de *Mahmud* el la vilaĝo *Kahab-Roso*. Li estas karakterizata de la *avarianoj* kiel realisto. Ili diras:

— Antaŭ li, oni kantis pri temoj poeziaj; nur li komencis kanti pri la ĉiutagaj aferoj de la vivo.

Mahmud el *Kahab-Roso* dum la mondmilito fariĝis soldato de rusa armeo kaj partoprenis en la konata militiro sur la montojn Karpatojn. Li forlasis sian amatinon en sia patrujo. Li ne povas kaj ne volas ŝin forgesi. En Galicio, en bazaroj, en vendejo de hebreoj, sur la muroj, kovritaj per afiŝoj de kinoteatroj, li serĉas portreton de virino, kiu rememorigus al li sian amatinon. Subite li trovas similecon inter iu fotografaĵo reprezentanta Marion, patrinon de dio, kaj lia amatino en la patruja montaro. La leganto vidas la subtilan kontraŭstarigon de lia ama sento al la adorado de kredantoj, — kontraŭstarigon, kiu estas inda por ĉiu vere granda poeto de iu ajn granda nacio. La poeto estis mortigita en 1919.

Tiun ĉi kanton, faman en la tuta Avario, ni prezentas esperantlingve al la leganto. Nia traduko estas proza; ĝi gardas, sekve, ĉiun poezian esprimon, kiun ni trovas en la originala teksto, kun la plej plena precizeco.



ORIENTO
EL LA ALTO DE AEROPLANA FLUGO

(Impresoj pri la aviad-ekspedicio Moskvo—Ulan-Bator-Ĥoto—Pekino—Ŝanĥajo)

GREGORO ROZENBLAT

10. junio 1925 el Moskvo ekflugis 6 aeroplanoj direkte al la Oriento. Ilia vojplano kuŝis trans urala montaro, grandegaj spacoj de siberia praarbaro, Bajkala lagego, sovaĝaj stepoj de Mongolio, nuda dezerto Gobi-Ŝama, alta Kalgana montarspino kaj fine trans senlimaj ĉiniaj rizomarĉoj unuflanke kaj trans Koreo kaj japana maro direkte al Tokio aliparte. La tuta distanco, kiun devis traflugi tiu-ĉi aviad-ekspedicio, ampleksis pli ol 10000 kilometrojn.

Mi havis feliĉon partopreni tiun ĉi vojaĝon kiel korespondanto de la moskva ĵurnalo "Pravda" (Vero) kaj kiel sekretario de l'ekspedicio. Krom mi flugis ankaŭ 4 aliaj ĵurnalkorespondantoj, du kinooperatoroj, 6 pilotoj, 6 mekanikistoj kaj ĉefestro de l'ekspedicio k-do Ŝmidt. La ekspedicio havis tre gravan signifon, celante trovi novajn vojojn por interligo de l'okcidento kun la Oriento, kaj prezentiĝis kiel entuziasma tutpopola demonstracio de simpatio kaj fratsentoj al la vekiĝanta orienta laborularo.

Vekante grandajn manifestaciojn en ĉiuj haltolokoj dum sia tuta vojo, la ekspedicio pasis la urbojn Niĵnij-Novgorod, Kazanj, Sarapul, Krasnoufimsk, Kurgan, Omsk, Novo-Nikolaevsk, Krasnojarsk, Niĵneudinsk, Irkutsk, Verĥneudinsk, Troickosavsk kaj la 2. julio ni estis jam ĉe la limo de mongolia popola respubliko.

Laŭ la invito de mongola estraro ni transiris la landlimon por partopreni mitingon en Altan-Bulak. Necesis atendi en tiu ĉi loko alvenon de du postrestintaj flankvoje poŝtbiplanojn kaj kune kun ili atingi la pluflugintajn antaŭen. Tuj post kiam la restintaj biplanoj alflugis ni daŭrigis kune la vojon kaj la 4. julio matene ni venis al Ulan-Bator-Ĥoto (Ruga Fortegul-Urbo), ĉefurbo de la mongola respubliko, antaŭe havinta nomon Urga.

Ulan-Bator-Ĥoto sidas en valo, kiu kredeble antaŭe kune kun la dezerto Gobi estis fundo de oceano. La urbo similas vastan vilaĝon kun disĵetitaj senorde argildometoj (fanzoj). En la centro de l' urbo estas granda placo, kiu dum pluvo estas plenkovrata de akvo. Proksime staris du registaraj duetaĝaj dometoj, kie laboras la mongolia parlamento — Ĥuruldan — kaj la ministraro.

Tra la stratoj oni veturadas tien-reen sur azenoj, ĉevaloj, kameloj; vagas multegaj nigraj hundoj; pasas homoj kaj inter ili virinoj kun eksterordinare strangaj kapornamoj. Ofte estas renkonteblaj armitaj mongolaj popolarmeanoj — cirikoj — kun pintoĉapoj sur la kapoj.

La ekspedicio estis solene renkontita de la registaro kaj popolo. Ni kun intereso rigardis la popolan vivon, kiu videble tre ŝanĝiĝas pro la trafaj reformoj de la revolucia registaro. Ankoraŭ multaj malnovaj kutimoj daŭras ekzisti. Ekzemple, oni ne enterigas la mortintojn, sed ĵetas por ke hundoj ilin formanĝu. Multaj lamaoj (monaĥoj), kiuj estas varbataj el ĉiuj unuanaskitoj, ne laboras, sed dediĉas sin al preĝado. Tiu ĉi preĝado ordinare konsistas nur el tio, ke estas turniĝadigata je sia akso speciala cilindro kun skribitaj sur ĝi preĝoj, estas batataj ornamitaj tintiltamburetoj, aŭ estas ŝutata kun preĝmurmurado sankta sablo ktp.



Ni havis sukceson esti unuaj eŭropanoj, kiuj povis penetri kaj rigardi la sanktan templon de Budho – Darja Balha. Al ni eĉ prosperis kinematografumi gigantan statuon de Budho kun 6 brakoj kaj grandaj safir-okuloj. Ordinare vidi la vizaĝon de tiu ĉi statuo estis permesate al neniu kaj nur la ter-dio Bogdo-Gegen rajtis ĝin vidi. Lasta Bogdo-Gegen mortis en 1923 kaj post lia morto la mongolaj likvidis lian kulton.

La Mongolia Popol-Respubliko estas fondita en 1921. Alte respektata estas la unua komandinto de la mongola revolucia armeo Suĥe-Bator, nun mortinta, kiu estis fondinto de la respubliko. Tre interesa estas persono de la ministro por internaferoj Navan-Nerin-Cecenĥan, praido de Cingiz-Han. Li estis posedanto de granda "ajmak" (provinco), egalinta al unu kvarono de la tuta Ekstera Mongolio, sed li memvole rifuzis sian titolon de grandduko, fordonis sian tutan terposedaĵon, fortranĉis la harligaĵon (ekstreme revolucia ago) kaj membriĝis al la popola revolucia partio.

La registaro komisiis al unu el siaj membroj k-do Ĥajan-Ĥirob gvidi nin kaj helpi al ni ekkoni la vivon de la lando. Li estas membro de Centra Komitato de la popola partio, komisaro de la Regna Interna Defendo kaj ĉefo de la partia lernejo. Ni sidiĝis la aŭtomobilon. Granda embaraso estis, ĉar mankis interpretisto. Ni deziris multon demandi, sed ne estis eble.

Sidinta en nia aŭtomobilo ambasadoro de USSR en Mongolio k-do Vasiljev rakontis, ke k-do Ĥajan-Ĥirob multe vojaĝis, estis en Francio, Turkio, USSR kaj estas interalie esperantisto.

— Ĉu vi parolas esperante? — mi kun miro ekkriis.

K-do Ĥajan-Ĥirob neatendite kvazaŭ konfuziĝis kaj trabalbutis montrante al mi SAT-insignon, kiun mi antaŭe ne rimarkis. — Jes, mi parolas.

Tuj la afero ŝanĝiĝis. Ni komencis vigle interparoli, li multon multon montris kaj rakontis al ni, mi estis tradukanta al miaj kunuloj kaj k-do Vasiljev emfaze konkludis:

— Jen estas la efektiva utilo de la lingvo internacia!

Avia-telegramo al Moskvo. Al la redakcio de "Pravda". Ekstervice. Senprokraste. Urĝe.

"Frumatene morgaŭ ni ekflugos dezerton. Netrairebla estis ĝis nun la granda dezerto Gobi. Furiozofortaj "samumoj", ĝiaj ĉiamaj mastroj, je ĉiu paŝo nin persekutos per siaj magneto-perturboj. Danĝera, senlime danĝera

estas la vojo trans Gobi. Estas facile devojiĝi, kaj la vojperdinton atendas senevitebla pereo. Tamen la sperto de la trairita vojo, la perfekta kvalito de la personaro kaj maŝinaro de l' ekspedicio, la streĉita laboro pri preparado de la transflugo firmigas en ni la certecon je ĝia sukceso . . .

Trans la varmega dezerto Gobi ni sendas al vi, ho granda ĉina popolo, nian flaman saluton . . ."

Ulan-Bator-Ĥoto dormas. Longdaŭra ĝembojado de la hundaro aŭdiĝas en tiun-ĉi malgrandan argilan "fanzon" de la Registara Telegrafejo, de kiu ni transdonas tiun-ĉi telegramon. Hodiaŭ unuafoje en la historio de l' homaro flugos aeroplanoj trans la mistera dezerto Gobi. La sovetaj aeroplanoj . . .

Aŭtomobile ni veturas frumatene al la sankta monto Bogdo-Ul, kie troviĝas la aerodromo. Multkolora amaso de la indiĝenoj — mongoloj kaj ĉinoj — ĉirkaŭas nin. El la amaso eliras "lama-gabĵa" — monaĥo-filozofo en ruĝa turbano kaj ruĝa ĥalato (kitelo). Li estis ekscitata, lia gorĝparolado estas nekomprenebla. La interpretisto rakontas, ke tiu "lama-gabĵa" avertas pri la potencega dezertodio Vaĉirvani, kiu per fajrosagoj el la ĉielo cindrigos niajn "tumur-terge" (fer-ĉarojn). Sed oni ridetas ĉirkaŭe. Lastafoje ni fotografiĝas grupe kaj enkabiniĝas.

Funkciigataj estas la motoroj "Kontakton!" "Estas kontakto!"

Ni ekflugas jen super la valo, super la montoj. Forta vento premas nin al la montospinoj de Girĉilu, Burlik-Aba kaj Burul-Ĥangaj. Eksentiĝas brulanta varmego: Farenheit 120°.

Flavaj spacoj. Senlimaj sabloj. La tuta vojo el Ulan-Bator-Ĥoto ĝis oazo Udde (la koro de Gobi) estis pasita dum 5 ½ horoj en la aero, dum la karavanoj tiun ĉi distancon pasas dum 30 tagoj. Ni sukcese venkis la samumon, kiu nin pilke ĵetadis kun sia mortterura forto.

En Udde kunkuras renkonte al ni mirigitaj mongoloj kaj ĉinoj. Ili estas forte timigitaj. Ili opinias, ke ni estas surteriĝintaj feoj, sed interpretisto-mongolo, veninta tien ĉi antaŭ nia alflugo, malfacile klarigas, ke ni estas simplaj homoj el malproksima lando, kie libere vivas "arat", la simpla popolo — "ulutborĉin" (kamparano) kaj "tariaĉin" (laboristo) — mastroj de sia regno. Tiam ĉiuj senkuraĝe aliras iom post iom, ridedante, kaj avide rigardas.

Du argildometoj, ĉirkaŭitaj de argila barilo — jen estas la tuta oazo Udde. Nek arbeto, nek rivereto, nenia ombro. Staris niaj aeroplanoj alligitaj — kaj proksime maĉadas humilaj nelacigeblaj kameloj. Kameloj kaj biplanoj! Antikvaj tempoj kaj la jarcento de la helico! Kia kontrasto!

Kvin aeroplanoj bone venis al Udde, la sesa "Latva Pafisto" avariis, kaptita kaj turnĵetita de la samumo. Feliĉe la avario estis rapide en la dezerto (!) riparita kaj "Latva Pafisto" kun ioma prokrasto atingis nin poste en Pekino.

En Miastan (Hingocheng) okazis nova avario je la aeroplano "Pravda", en kiu mi sidis. La piloto Polakov, dum la surteriĝado ne rimarkis en alta herbo kaŝitan montetaĉon kaj rompiĝis rado kaj kelkaj aliaj partoj de la aparato. La ceteraj kvar aeroplanoj bone sidiĝis. Estis nia unua surteriĝo sur la ĉinia teritorio — je 30 kilometroj de Kalgan, rezidenco de Fen-Juj-Sian, ĉefkomandanto de ĉiuj popolarmeoj en la ĉina respubliko.

Nin solene kun orkestro renkontas popolamasoj kaj militistoj. Sonas salutparoloj de generalo Ĝam. Hura-krioj.

En Miastan ni restas dum tri tagoj kaj la 13. julio matene malgraŭ nebulego kaj forta vento kvar aeroplanoj ekflugis Pekinon. Mi flugis en la aeroplano "Ruĝa Teksisto". Marego da nuboj, kaŝante de ni altajn kalganmontojn, serioze minacis al ni. Sed fine la nuboj disiĝis kaj ni vidis la grandan ĉinan muraron, longe etendiĝantan sur la deklivoj.

Baldaŭ montriĝis sub nebulo vastaj spacoj de la grandega orienta



Ulan-Bator-Ĥoto — ĉefurbo de Mongolio.

Parizo—Pekino. Ni flugas rekte super la centro de l' urbo, super la diplomatia kvartalo, plimalsupreniĝas, farante rondflugojn. Ni vidas, kiel malsupre la popolo svingadas per brakoj kaj flagoj. Ĉirkaŭfluginte la urbon kelkfoje, ni nin direktas al la aerodromo Najoan — je 20 kilometroj de la urbo. Alflugante tien, ni vidas multajn milojn (150000) da popolo, veninta por nin renkonti.

Ni alteriĝas. Neforgesebla momento. Muziko de l' orkestroj. Kriado de la popolo: "Nan-Suj" (hura). Ruĝaj standardoj. Floroj.

— Lenin! Bolŝevik! Gomindan! Nansuj!

Sekvas ceremonio de la oficiala renkonto, pri kiu mi ne raportos detale. Fine ni veturas la urbon. Dum la tuta vojo 20-kilometra multegaj amasoj ambaŭflanke krias al ni salutvortojn.

Post multaj bankedoj, akceptoj kaj vizitoj ĉe la ĉiniaj ĉefoj kaj sociaj organizaĵoj ni komencis nin prepari por plua flugado. Laŭ invito, de l' japana registaro du niaj aeroplanoj devis flugi Tokion kaj tri aliaj — Ŝanĥajon tra Loyang (Henan), Chenghsowho, Nanking. Mi flugis kun la ŝanĥaja parto de l' ekspedicio, tie nia flugado finiĝis: entute ni pasis ĉirkaŭ 10000 kilometrojn dum 68 flughoroj en la aero.

Finante tie ĉi mian rakonton, mi volas diri pri kelkaj interesaj epizodoj, kiujn mi spertis dum nia restado en Ĉinlando. Mi havis okazon tuj post veno al Pekino veturi Kalganon por viziti la generalon Fen-Juj-Sian. Li min akceptis je la 6-a horo matene ĉe sia hejmo (granda honoro). Ni havis longan konversacion pri diversaj temoj, tiun intervjuon mi sendis al "Pravda" Moskvon. La armeo de Fen-Juj-Sian estas tre disciplinita, mi ĉeestis paradon. Tre karakterize estas, ke sur maldekstra brako ĉiuj soldatoj de Fen-Juj-Sian havas surkudraĵon, kie estas skribita la devizo pri la batalo por liberigo de la ĉina popolo de la imperialistoj. Fen-Juj-Sian donacis al mi sian portreton kun aŭtografo kaj arĝentan vazon.

Reveninte Pekinon mi komencis studi la vivon de la ĉina popolo. Min forte impresis grandega mizero de la pekinaj laboruloj. Plej rimarkindaj estas la homĉevaloj (rikŝoj), kiuj por unu kupra monero veturigas sur si la pasaĝerojn kaj ofte dumkure eĉ mortas, eĉ ne atingante 30 jarojn. Ofte ni ne povis nin deteni por esprimi al ili nian simpation. Foje ni prenis kun ni de sur la strato kelkajn rikŝojn, sidigis ilin kun ni en aŭtomobilon kaj kune veturis tra stratoj. Oni nin kun granda mirego rigardis el ĉiuj flankoj: tio estis tre eksterordinara, ĉar rikŝoj estas la plej ignorataj kreaĵoj en Ĉinio.

Ni venigis niajn malfeliĉajn kamaradojn al restoracio. Kun kia avideco ili glutis la bonajn manĝaĵojn! Kiel brilis iliaj okuloj! Riĉe vestitaj sinjoroj en la restoracio laŭte indignis kaj demonstracie estis forirantaj. Sed ni ne atentas ilin.

Poste ni iris kinoteatron. Ĉe la enirejo, aĉetante biletojn, ni estis avertitaj, ke la rikŝoj ne estas tralaseblaj. Sed ni insistis kaj oni cedis. En la halo ankaŭ okazis preskaŭ skandalo, sed ĉio pasis sen gravaj akcidentoj. Ni ĝojis, ke niaj rikŝoj estis kontentegaj senlime . . .

Similaj niaj aventuroj faris evidente tiom multan impreson en Ĉinio, ke kiam ni venis al Nanking, nin renkontis kvinmila amaso da policanoj. La cetera publiko forestis: oni ne permesis veni . . .

Bedaŭrinde, mankas loko en tiu ĉi numero de "S. R." por pli detale rakonti pri multaj aliaj interesegaj aferoj, kiujn mi vidis en la oriento. Mi ne



supozis, ke dum tiu ĉi vojaĝo mi povas renkonti ankaŭ multajn esperantistojn. Mi konvinkiĝis, ke Esperanto estas forte disvastigita en la Oriento. Ekzemple, en Ŝanĥajo mi ricevis vizitkarteton de Ŝanĥaja federacio de la ĉina studenta unuiĝo skribitan . . . en Esperanto. Mi parolis kun kelkaj ĝiaj komitatanoj en Esperanto! En Pekino mem mi havis esperantolingvan konversacion kun filo de la ministro por eksterlandaj aferoj, s-ro Ŝen.

Espereble, prezentiĝos al mi okazo ankoraŭfoje rakonti pri la sama historia aero-ekspedicio — ankaŭ el la vidpunkto de la aviad-tekniko.

Balado pri Lenin kaj Li-Ĉan

Kunigis homojn el ĉiu land'
La strata abund' Pekina.
Sur stratoj tre longe vagadis Li-Ĉan'
Mizera kulio[1] *ĉina.*
Kaj vagis Li-Ĉan en labor-servut'
Sur la kampoj ĝis nokt' profunda,
Pro batoj de la inspektista knut'
Lia dorso fariĝis vunda.
Sur kampo kie spiras de l' te' arom',
Foje blovis salut-venteto.
Sur la kampo, faligis fortika hom'
Foje pecon de l' gazeto.
La kulio, malsana pro batoj de l' skurĝ',
Tralegis pri lando ia,
En kiu nek la mandarenoj nek burĝ'
Regas, sed la liberaj kulioj,
Kaj tie sur paĝ' de l' ĉifita gazet',
Kiun mano tremanta tenis,
De la ĉef' desegnita estis portret'
Kaj staris la nomo: Lenin.
Kulioj kunvenis en ĉiu nokt'
(Kiam steloj komencis brili).
Verkadis legendojn, ke venos vok'
De Lenin — li helpos al ili.
Ke por mandarenoj alvenos fin',
Ke vokos de kampoj ĉiuj
Lenin al urb' ribelonta Pekin'
Kuliojn el Tut-Ĉinio . . .

Tage — Suno, tage — la vip' . . .
Nokte kulioj solenis,
Kaj flugis nomo de lipo al lip'
Ripetata de ĉiuj: "Lenin".
Kaj rigardis al tiu gazetfoli',
Al strabeta okul' portreta,
Longe rigardis ĉiu kuli'
Al ĉifita paĝo gazeta . . .
Li-Ĉano glutis ree Pekin'
Severa kaj multestrata,
Svarmaj homoj en stratkombin',
Li-Ĉan senlabora malsatas.
Sonas kri' — pli dolora ol pik'
Por Li-Ĉan estas tiu krio —
Mortis ĉefa la bolŝevik' —
Lenin — en fora Rusio.
Li-Ĉan' konsterniĝis pro tiu ĉi nom',
Malsereniĝis lia okulo,
Sidiĝis Li-Ĉano ĉe ies dom',
L' okulojn ekkovras nebulo.
Lenin mortis . . . Ilia sort'? . . .
Sama mizera ekzisto? . . .
Ĉu ĉion toleri ĝis veno de l' mort' —
La vipon kaj kuglon murdistan.
Mortis Lenin. Li de l' foli'
Pri libero kaj venk' parolis.
Neniam pro vipo ekplorus kuli',
Tamen nun Li-Ĉan' ekploris.

Tradukis el rusa lingvo *Sutkovoj*.

---

1) Ŝarĝportisto

Rimarko: La originalo aperis anonime kiel kolektiva verko de Moskva Asocio de Prolet-Verkistoj (MAPP).

DU EL GRANDIOZA MONDPATRIO

Novelo

VL. KUZMIĈ

Al kunbatalanta SAT-ano JOHN NILSSON mi dediĉas ĉi novelon.

Ne la nomoj komencis ĉi aferon.

Ĝin ne povis komenci ti-kiuj mem dependas de interrilatoj en la klasbatalo. Ĝin komencis "Sennaciulo" — la konata organo SAT-ana.

Vi rediros, ke "Sennaciulo" estas kreita de la homoj, do ne! Ĉar la homoj, iliaj aferoj, liaj psikologioj ankaŭ estas konstruataj de la Klasbatala Epoko.

Do, "Sennaciulo" kulpas en ĉi afero.

I

Sciu la alfabeton de l' mondrevolucio kaj vi povos legi la grandan libron de l' Estonto!

. . . Al ĉiuj, al ĉiuj proklamis "Sennaciulo".

Ĝiaj fakoj "Korespondado" kaj "Tra la Klasbatalo" estis plenaj de novaĵoj pri sukcesoj, de informoj pri lingva venko ktp.

Kaj SAT-anoj estis kunligitaj per tiuj literoj senvizaĝaj; en la mortaj literoj vivis signifo, farante la aferon de la mondpatrio.

Kaj nefama regnano de l' mondpatrio — franciano Henri N . . .

. . . kaj orienta regnano de l' sama mondpatrio Juan-Li . . .

. . . kaj multaj aliaj eksciis pri la okazintaĵoj, ekparolis al ili la senvizaĝaj literoj.

Tiel (pro alvoko en "Korespondado") Henri ekkorespondis kun ĉiniano. Kaj tiel ankaŭ Juan-Li konvinkiĝis pri la venka irado de Esperanto en orientaj kaj okcidentaj landoj.

Tial ili interkorespondis kaj ilia kunligo daŭris longtempe. Tial iliaj pensoj fariĝis frataj, karaj.

II

Kiam nova letero estis ricevita, Henri iris en komunan kajuton, legis ĝin sub bruado de marondetoj kaj poste komprenigis al maristoj pri Esperanto. La maristoj de militŝipo amasiĝis ĉirkaŭ li, la maristoj aŭskultis.

— Ha, jen estas! Jen! Henri, donu al mi cian folion! Kio estas? Ĉu proklamaĵo? — per laŭta voĉo la oficiro ektimigis la maristojn, sed ili restis en la kajuto por helpi per io al sia kamarado.

— Ho, brave! Ĉi estas esperantisto? Ĉu jes, mia karulo? Kaj de kiu esperantisto, el kiu lando ci ricevis tion? Mi mem ankaŭ estas esperantisto! — la oficiro Victoir Chaulagne legis la leteron, kaj Henri antaŭstaris silente. Sed la rigardo oficira malsereniĝis kaj subite li diris:

— Kiaj vortoj ribelaj! Ĉu ci estas komunisto?

— Ne, via moŝto. Povas esti, ke tiu ĉiniano estas komunisto, sed mi — ne. Se mi eĉ simpatius al ili, mi ne dirus pri tio.

— Karulo, ĉu Esperanto deklaras la batalon, sed ne la pacon kaj la sufiĉon de unuiĝo per lingvo?

Henri trankviliĝas. La lukteto finiĝis bone. Sed li ne samopiniis kun oficiro kaj respondis:

— Ne, via moŝto! Mi ne konsentas. Esperanto servas . . .

— Ho, ĉu ci opinias, ke mia kapo estas pli malsaĝa ol cia? Ne, ne . . . fulmotondro . . . ci ne provu disvastigi tiajn abomenajn ideojn aŭ ci estos . . .

Kaj Victoir Chaulagne foriris, kunpreninte la leteron kaj "Sennaciulon".

III

. . . En oficira kajuto Victoir tralegis al ĉiuj "strangan leteron" kaj la ridaĉo nobleca venis responde al la vortoj elmalproksimaj, elorientaj, Ŝanĥajaj:

Kara SAT-ano Henri!

. . . ni strikas en nia tekstilfabriko kaj via eleŭropa saluto estis renkontita per ĝojaj krioj en nia SAT-grupo . . . .

Victoir regalis sian kunulinon per pomoj kaj persikoj kaj ties ŝelo estis kolektata en paperaĵon de "Sennaciulo". Ambaŭ gaje konversaciis esperante, Victoir fanfaronis al ŝi, ke li virtuoze posedas Esperanton, ĉar li sportisme dediĉis sin al lingvaj aferoj.

La ondoj estis bruantaj, la vento freŝa movetis iliajn vestaĵojn, dum ili tiel milde prikantis la elpensaĵon de homaro.

. . . Kaj la letero de Juan-Li (Victoir jam forgesis pri ĝi) estis pendigita en ĉambreto, ĉe kies eniro estis skribite: OOO.

IV

Dum nigra-nigra nokto oni diris al ili:

— Post unu horo ni forvojaĝos al Ŝanĥaj. Tia estas la ordono sekreta.

Kaj tra la ŝipo ekkomencis la kurado. La haveno de Marseille brilis per siaj bordaj lumoj . . .

V

Ne sciis Juan-Li, ke respondo al lia letero ne estas sendata al Ŝanĥaj, ke la homo mem, la viva respondo, veturas tra Hinda Oceano al Ĉinio. Tiu vivulo ridante rigardis al ekstremaĵo de l' ĉielo, kie ludis la ondoj.

— Kien oni veturas? — demandis la maristoj.

— Kaj por kio? . . .

— Por promenaĉi kun prostituistinoj ĉiniaj, — kaj la ridaĉo fulmaperis sur lia vizaĝo.

La maristoj rigardadis en malproksimaĵon, sed la horizonto estis malplena.

VI

Subite el post la strata angulo aperis grandamasa manifestantaro.

La armitaj maristoj haltis. Sed ilia ĉeesto nur incitis la amason.

La amaso pligrandiĝis; ĝi murmuregis:

— La mitrajlilojn antaŭen! — kriegis la oficiro.

— For la imperiistojn! Ho-ho-oho! F-o-o-o-r!

Pafilo ektremis en la manoj de Henri.

Victoir laŭtvoĉe ordonis al la amaso:

— Laŭ ordono de l' guberniestro ne eniru en la eŭropanajn kvartalojn! Ni estos pafantaj!

La bruega incitita popolamaso iom post iom alproksimiĝadis al la maristoj. Evidente iu gvidis la mason.

— Haltu!

Iu levis sur siajn ŝultrojn oratoron, kiu tuj komencis paroli en sia lingvo.

— Aŭdu mian komandon! Trankvile! Pafu salve supren. Atentu signalon! — histerie kriis la oficiro.

La oratoro finis paroli kaj miksiĝis en la amason. La manifestantaro ekondis denove, ĵetante neniigantajn rigardojn al la eŭropeanoj. Kelkaj ekfanatiĝintaj knaboj ĵetis ŝtonojn en ilin.

— Abomenuloj! — ekkrietis sur iu balkono sinjorino, vidinte ke unu ŝtoneto batis la kapon de Henri.

— Al mia heroo-patrioto! — lirike ekkriis ŝi kaj pure-blanka rozo falis sur la pavimon. La rozo trafis en polvon. Victoir kaptis ĝin, elegante salutante la sinjorinon.

— Ho, mia amiko, pardonu, ĝi estas destinita al la suferinto! Mia maristo prenu la rozon!

La duone senhonorigita oficiro devis transdoni ĝin al Henri.

En la kapo de Henri ĉio malklariĝis. Antaŭ liaj okuloj trafluis ruĝa vualo, sed li aŭdis ĉion kaj kun indigno li forĵetis la floron.

— Ho, fraŭlino, — diris li: — tiun rozon mi ĵetas al ili, kiuj ribelas kontraŭ subpremantoj de sia lando!

— Kia aĉulo — ekparolis Victoir: — Militisto ne devas paroli kun ribelantoj. Al ili mankas plumbo, sed ne la rozoj!

La amaso bruegis, balancis la kapojn, aŭskultis la parolantojn. Jen ĉion kovris per siaj metalaj sonoj la krio de laboristo. Ĉiuj ekrigardis tien.

— Ĉu estas li? —Henri enkojniĝis per sia rigardo en la lertan junan korpon. Estas certe li — tion pruvas rapideca komparo de la fotaĵo kun la originalo.

— Juan-Li! Amiko!

— Simplulo Henri!

— Hej, frenezulo! Mi ĵetos cin al militjuĝo! Revenu en vicojn!

— Jen, min oni alvokas. Sed sciu, ĉinianoj, ke imperiistoj pafos en la manifestantojn. Liberigu do rapide! For la imperiismon!

La amaso decideme ekmoviĝis antaŭen. La ŝtonoj ekflugis denove. Tiam eksonis la komando:

— Paf!

Kaj akra ekbato superlaŭtis ĉion kaj per plumbaj kraĉaĵetoj forflugis ĉielen.

— A-a-a-a-a! . . . Ekzekuto! — la amasoj formoviĝis. Alfluo de entuziasmo dronis en la ĝenerala bruego.

— Ekzekutisto! Ci ne rajtas mortigi nearmitulojn! — ekkuris Henri al la oficiro. Sed denove eksonis la komando, denove la griza, nigre-blua fumo eniris naztruojn kaj morde pinĉis. En frenezaj ĝemoj kaj krioj la unua vico de l' demonstrantoj falis surteren.

Henri pikis la oficiron per la bajoneto kaj, simile al bizono, falatakis lin. Denove oni aŭdis komandon, denove la salvoj kiel sangaj skurĝoj faladis sur la amason, sur la laboristojn. Freneziĝintaj kulioj tiam antaŭensaltis al la maristoj, al la anglaj kaj francaj maristoj.

VII

Duono da roto rifuzis obei kaj forĵetis la pafilojn.

— Tio ĉi estas ribelo, — nur kriis Victoir kaj signalis remarŝi.

VIII

. . . Kaj ili ambaŭ, Henri kaj Victoir estis kaptitaj de kulioj. Oni metis ilin en malpuran ĉambron, kiun oni nomis malliberejo.

Por esploro oni vokis ilin ĉiun aparte.

Victoir sciis anglan lingvon, li ion rakontis kaj, evidente, li sukcesis konvinki pri sia senkulpo, ĉar la esploro baldaŭ finis.

Kiam oni vokis por esploro Henri, li komprenis la unuan demandon:

— W h o a r e y o u ?

Sed ne povante respondi angle, Henri rapide foriris el la ĉambro, ne kompreniginte la esencon de l' afero kaj la kulpon de aliaj.

Nur eksciis Henri, ke li pro mortigo de laboristoj, kiel malamiko, estas mortigota. Estis do la lastaj horoj de lia vivo. Kaj la silento ekposedis lin.

IX

Juan-Li venis en la ĉambron de l' stabo kaj eksciis, ke estas arestitaj du maristoj: oficiro kaj simplulo, ambaŭ kaptitaj en la batalo. Unu el la gvidantoj rakontis, ke pri unu jam zorgis franca konsulo kaj li, la oficiro, jam estas liberigita, kaj la maristo estas transdonita en la manojn de kulioj.

— Mi timas, ke ilia ekscito kaŭzos al li morton! Li parolis ion en Esperanto, sed ni nenion komprenis.

— Nu? Kia estas lia nomo? Ĉu franca?

— Ŝajnas. Iu Henri, pli mi ne memoras.

Juan-Li ekkuris, sekvante la lastan vojon, kiun jam estis irinta la malfeliĉa maristo.

. . . Jen la pafiloj jam surpreniĝis, kiam Henri esprimis la deziron premi la manojn de ĉiuj, kiuj tuj mortigos lin. Kaj tio savis lin. La manpremado kaŭzis la momentan nedecidemon en la vicoj de la pafontoj. Subite aŭdiĝis la voĉo:

— Haltu!

La pafiloj faletis. Juan-Li alkuris al la loko de l' ekzekuto ĵus antaŭ ol ĝi fariĝis fakto.

— Do, kial vi mortigas proleton?! Ĉu vi estas SAT-ano? Kia ĝojo!

Kaj iliaj manoj kuniĝis en frateca premado. Pro granda ĝojo la liberigita Henri superŝutis la savinton per torento de esperantaj vortoj.

X

. . . Tiam Henri varmege parolis en Esperanto al la ĉiniaj kamaradoj, kiuj amasiĝis ĉirkaŭ la tribuno. Per helpo de Juan-Li, kiu tradukis, la kamaradoj komprenis, ke la batalo estos unu, granda, kolosa, sed per unuigita fronto — laŭ la testamentoj de Sun-Jat-Sen, de Lenin — por forigi la kapitalistojn ĉu blankvizaĝajn, ĉu flavhaŭtajn.

Tiumomente kun nova roto de armitaj maristoj aperis Victoir kaj vidis Henri parolantan sur la tribuno. La scio de Esperanto helpis al li kompreni ke ne la pacemajn vortojn diras Henri.

— Tio estas perfido! — li murmuris.

La maristoj atentis nur lin, nur lian komandon.

XI

La standardoj denove estis portataj en la unuaj vicoj. La demonstrado de protesto kontraŭ mortigo okazis en la eŭropanaj kvartaloj. Ĉe magazenoj estis forŝirataj la ŝildoj. Tiel okazas, kiam el fandforno elfluas fera kuiraĵo kaj ĉiu enĵetita peceto ŝvelas en ĝi per luma flameto.

— Embusko! — iu ekkriis en antaŭaj vicoj.

— Trankvile! Tio estas provoko de spionoj.

— Kuraĝe!

Kaj la amasoj ekmarŝis, similaj al pulvo tuj eksplodonta.

— Kial oni ne iras? — ondiĝis la vokoj.

— Oni ne povas!

— Ĉinianoj ne povas, ne rajtas en sia lando?

— Sed kiu diris al ci, ke ĝi estas ĉiniana? Ĝi estas fremda . . .

Henri kaj Juan-Li iris kune; ili vidis kiel ondis la ekscitita homa oceano.

— Plu ne estas vojo!

— Kiu ne permesas?

— Ti-kiu elsuĉas la oron, sed pagas per plumba pluvo!

Subite per kuglaj abeloj ekblovis salvo al la unua vico, kie en sufoko, en la polvo, en la elvaporaĵoj dronis ĉiu krio.

Meze de mortigitoj kaj duonmortigitoj, meze de provundaj ĝemoj ambaŭ ekvidis kiel falas homoj.

. . . Kaj kiam Juan-Li ankaŭ falis, venkita de kuglo, Henri forgesante la necesajn vortojn alkuris al li. Kaj ekkriis la frata animo per lia voko:

— He, kiu estas? Esperantistoj — venu ĉi tien! Savu proleton!

Responde alkuris kvar kamaradoj SAT-anoj.

La palpebroj de Juan-Li malfermiĝis, el tie rigardis la malheliĝinta ŝtalo de l' okuloj.

— Amikoj . . . Mi mortos . . . Vi estas tie ĉi? Bone, kamaradoj! — sed la suferoj nebuligis liajn pensojn kaj inter la vortoj aperis paŭzoj.

— Faru ĉion por batalo . . . Adiaŭ, mia franca kamarado . . . kiel mallong . . . tem . . . pa . . . estis nia . . . konateco . . . Esperanto . . . vastigu ĝin . . .

La okultremo malaperis, la korpo etendiĝis, kvazaŭ laŭlonge de ĝi estis ŝovita bastono en ĝin. Li mortis.

Senvorte ili — ĉeestantaj esperantistoj, staris ĉe la kadavro, kvazaŭ orfaj tuboj de granduzino. Juan-Li forlasis ilin.

Unu el la bluzuloj levis de la tero lian pafilon kaj, silente karesinte la tubpinton, ekspiris:

— Ĉu tio perdiĝu? . . . Ne, mia karulo!

La penso bruligis lin, ekpulsis en la sango de l' ĉinianoj, forŝiris la kirason de l' prudenteco.

— Ĉu perdiĝu? Ne! venĝo por ekzekutoj!

Kaj Henri . . . Ĉu li ne estas proleto? Li iros kune!

— Militon al la palacoj! — eksplodis lia ekscito. Vidinte kiel la bluzulo karesas la pafilon, li ekbolis al kruela venĝo kaj ekkuris por serĉi pafilon.

— — — — — — jam trovita! Ĉiu nun havas! Kaj ĉiuj kvin iris sub la simbolo de kvinpinta stelo batali por libereco en ĉiuj kvin partoj de l' tutmondo.

XII

. . . Kiam estis mortigitaj en varmega batalo du militoficiroj, ili ne plu havis kartoĉojn . . . La parto de kunbatalantoj diskuris . . . Kaj ili estis kaptitaj. Oni metis ilin en malliberejon.

XIII

Henri denove estas en sia patrolando. Sed, se li eĉ estus plej flama patrioto, li ne laŭdus la karajn samlandanojn por la akcepto farita al li.

Ĉu vi opinias, ke li promenadis laŭlonge de Parizaj kajoj aŭ konversaciis pri la sensimila parlamento kaj aliaj Parizaj belaĵoj?

Ho, ne! Li flaris la malbonodoron de l' malliberejo kaj la longajn horojn enkarcerajn li provis plenigi per penado skribi ĉinlingve la vorton "Lenin". Kiam oni komunikis al li pri la tago de l' ekzekuto (ke tia estos lia fino, li bone sciis: al proleto ne ekzistas favoro aŭ indulgo), li petis permeson, ke al li estu alportita lia tuta korespondaĵaro. Oni permesis kaj la lamanta patrino alportis ĉion.

La matenruĝo jam briletis sur la ĉielo kaj cindre grizigis nubojn, kiam li finis legi la leteron:

Mia kara kamarado!

Mi ne scias vian sorton post la aresto via. Kiel amiko de Juan-Li, mi priskribos kio okazis en la stabo. La oficiro Victoir Chaulagne rakontis al ni, stabanoj, ke vi ankaŭ pafis en la manifestantojn. Li asertis, ke vi agis tute konscie, kiel militisto. Kaj vi, ne povante paroli angle aŭ ĉine, ne klarigis ke vi estas proleto kaj klaskonscia SAT-ano.

Mi kaj Juan-Li tiam ne ĉeestis. Oni opiniis ke vi, kiel malamiko de laborista klaso, indas la morton. Sed Esperanto savis vin. Ja Esperanto mem estas la proleta venko. Ne iu interpacigilo mistera ĝi estas, sed nia unuigilo por la mondbatalo prolibereca!

Salutu ĉiujn SAT-anojn. Skribu pri novaj sukcesoj. La aferon de Juan-Li ni daŭrigas.

Via nova amiko *Jan-Ĉun-San.*

— Jes! Skribu! — per senzorga malrapida voĉo diris la homo, kiu morgaŭ ne plu havos la homon "Henri", sed iĝos malvarma viando, bona sterko por la tero . . . La homo, kiu hieraŭ havis celon en la vivo, kiu hodiaŭ havas trankvilan animon, kiu morgaŭ ricevos la nomon de kadavro . . .

. . . Tiu homo rigardis siajn fingrojn. Li longe rigardis. Poste li mordis per akraj dentoj sian manon kaj, venkante la doloron, larĝigis la vundeton. La sango ekfluis kaj ruĝigis la manon kaj la fingrojn.

— Mi respondu al la letero! . . .

La homo, kiu morgaŭ perdos la nomon "Henri", aliris la muron kaj . . .

XIV

Malgrave vundita Victoir Chaulagne revenis en Francion. Nova ordeno ornamis la maldekstran brustoflankon.

Li ĉeestis la proceson, kiam en militjuĝejo Henri estis juĝata.

— Kiamaniere vi eksciis, ke la akuzato parolis pri ribelo? — demandis la prezidanto de l' juĝistaro.

— Ha, mi estas esperantisto kaj mi bone komprenis, ĉar li parolis esperante. Krome li frapis min per bajoneto . . .

Tial la nova ordeno ornamas la bruston de Victoir Chaulagne. Tial li promenas kun sia bela amatino kaj rakontas al ŝi siajn intencojn daŭrigi sian lingvan sporton per studado de turka lingvo.

XV

Centra Komitato de Internacia Ruĝa Helpo ricevis materialojn el iu franca malliberejo. Estis multaj leteroj, sed la plej grava estis la komuniko, ke iu malliberulo skribis sur la muroj de sia karcero per sia sango:


"*Esperanto servas al proletaro! Ne ekzistos unueca fronto sen la lingvo unuiganta. Vivu Esperanto — la alfabeto de l' tutmonda revolucio!*"

. . . Kaj "Sennaciulo" estis alportanta novajn informojn:

. . . Imperiistoj pafmortigas manifestantojn . . .
. . . strikoj en Ĉinio . . .
. . . esperantistoj de Ĉinio publikigas la proteston . . .

En la mondo ekzistas granda libro de l' Estonto, kiun povas legi nur kiu scias la alfabeton de klasbatalo . . .

EL LA JAPANA REVOLUCIA POEZIO



MORTIGATOJ POR LA HOMARO

JANASE MASAMU

Januaro!
Ah! Januaro!
De popolamasoj
Por la homaro
Mortigita homo,
Homo mortigita,
Kaj mortigito . . .

Januaro –
Unua monato de la jaro.
De popolamaso
Por la homaro
Mortigataj homoj,
Kaj mortigotoj . . .

Pasinta januaro,
Kaj januaro.

El la japana tradukis
R. O. R.

Rim. de trad. Kun la desegnaĵo tiu ĉi poezio de k-do Janase aperis en januara n-ro de japana gazeto "La Fronto". En januaro k-do Karl Liebknecht kaj k-dino Rosa Luxemburg estis mortigitaj, kaj en Japanio Kôtok Ŝûsui kaj liaj konspirintoj estis mortigitaj. Januaro estas unua monato de la jaro, plej antaŭkuranta.

MALLEVU LA STANDARDON!

HAĴIME, I

Fratoj!
Helproto ne venas!
Vento blovas, pluvo pluvas,
Uragano de la mondo!
Mallevu la standardon!
Malmultenombre,
Levante ĝin, marŝi neoportunas,
Ĉar ni povas esti forblovitaj.

Kune antaŭen iru,
Mallevante la standardon!
Senbrue!

Helproto ne venas!
Solaj ni devas marŝi.
Jam vesperiĝis . . .
Vento blovas, pluvo pluvas,
Uragano de la mondo!
Ŝparu moki malkuraĝulojn!
Ĉesante spiron, klinu la kapon,
Antaŭen iru tra l'uragano!

Malmultaj estas ni,
Ni estas malmultaj nombre.
Pluvo, vento, uragano!
Amasiĝante — neniam disiĝu!
Mallevu la standardon!
Levante ĝin, marŝi neoportunas,
Ĉar ni povas esti forblovitaj.
Ĝis kiam la tero haltos turnadon,
Neniam forlasu esperon al la tagiĝo.

Fratoj!
Ne apogu vin sur helproto!
Malmultenombre, kune, unuope,
Antaŭen kuru tra la uragano,
En la vasta kampo vespera!
Ĝis kiam ne plu restos krom unu,
Kaj la lasta unu falos teren . .

Nu, fratoj, premu mian manon.
Ni, do, antaŭen —
Senbrue kaj sensonore.

Kamaradoj!
Vento, vento, vento!
Pluvego! Uragano!
Ŝtoneroj flugas, sagoj flugas.
Mallevu la standardon!
Pro alta celo ne estu trapikotaj!

Fratoj!
La antaŭkurantojn ne perdu!
Alkuru al unua linio,
Trans kadavrojn!
Amasiĝu, klinu viajn korpojn,
Mallevu la standardon
Kaj kuŝante antaŭen iru
En nokta mallumo!

Kamaradoj!
Vento, vento, vento!
Pluvego, Uragano!

El japana lingvo libere tradukis *R. O. R.*

Noto de trad. La poemo estis dediĉita de la poeto al japanaj klasbatalantoj, kiam la bilo kontraŭ socialisma movado estis unuanime aprobita en Japana Parlamento. Ĝi estis presita en "Sentoo-Bungej" (Batala Literaturo) monata japana gazeto de la maldekstruma literaturo.

LA JAPANA LERNEJO

Japanio posedas sufiĉe densan lernejaron. La nombro de lernantoj estis jam 6,5 milionoj en 1901—1902, t. e. 88% el infanoj lernaĝaj. Ĉiuj-ĉi lernejoj estis fonditaj en 1870—1900. Oni povas konsideri grandegan progreson en la fako pri popolinstruado de 1900 ĝis 1925. Nuntempe la eduksistemo estas definitive starigita kaj celas "formi regatojn lojalajn kaj obeemajn".

Publik-Instrua ministro, vic-grafo Mori, de longe diris jenon: "Nia popolo ne sufiĉe respektas ŝtaton".

La malordoj kaj ekribeloj okazintaj en Japanio antaŭ 10 jaroj lasis postsignojn kaj jen tiel plej urĝa bezono estas *igi la popolon obeema* pere de edukado. "Nia popolo ne posedas ankoraŭ tiun amligon al la monarkio, kiu sola povas garantii normalan vivon: homo ne amanta siajn ĉefojn estas sovaĝulo".

Ni ankoraŭ citu la faman dekreton imperiestran proklamitan okaze de la dua datreveno de la konstitucio de 1890, ĉar tiu teksto difinas la bazon de l' edukado en Japanio. Gravas antaŭ ĉio resti fidela al la imperia dieca dinastio, la cetero ne tre gravas. "Niaj antaŭuloj sulkis la vojon, ĵetis la virtosemojn kaj dank' al la granda lojaleco kaj fila fideleco de niaj regatoj, tiu semaĵo donis riĉajn rikoltojn".

Tia estas la bazo de la nacia politiko kaj eduksistemo.

"Vi obeu la leĝojn de la lando kaj bezon-okaze vi servu lin memofere. Vi estu la firma apogo de nia imperia dinastio tiel eterna kiel la universo. Tiam vi meritos ne nur esti niaj fidelaj regatoj sed ankaŭ vi elmontros saman grandanimecon, kiel viaj antaŭuloj. Jen kion al ni testamentis niaj antaŭuloj. Ĉi-tio estos obeata de ni kaj de niaj regatoj."

Oni devas konfesi la meritojn de la ministraro publikinstrua: ĝi faris ĉion eblan por krei monarkistan edukistaron. La pedagogiaj lernejoj estas multaj en Japanio; ili estas proksimume kazernigitaj, ili havas kontrol-oficistaron varbitan ĉe la eks-militistoj. La programoj de la pedagogiaj lernejoj estas verkitaj laŭ la imperiestra dekreto kaj al la estontaj edukistoj oni parolas nur pri patriotismo, respekto al imperia trono ktp....

La edukisto devas esti portanto de alia virto: li kondutu inde en sia privata vivo kaj li obeu la aŭtoritatulojn. La instruistoj ne rajtas voĉdoni ĉe la urbaj balotoj.

Dank' al rigora kontrolsistemo la instruistoj el Japanio ankoraŭ ne sukcesis sin organizi en sindikatoj. La japana registaro tion ne konsentis. La urbaj instruistoj jam tion pruvetis sed ne sukcese.

Resume la japanaj edukistoj estas devigataj esti la subportantoj de la monarkista ideologio.

Ĉiuj lernej-planoj estas inspiritaj de tiu ideologio. La portretoj de la geimperiestroj kaj la imperiestra dekreto estas respektegataj en la lernejoj same kiel relikvoj. Dum la naciaj festoj, la lernantoj kaj instruistoj estas devigataj surgenuiĝi kantante la nacian himnon antaŭ la altaro, kie estas lokitaj la portretoj de la imperiestra familianaro. La ministraro indikas al la edukistoj la ritojn de tiu ceremonio. "Nia lando estas regata de dinastio neniel egala en aliaj landoj". Jen kion la instruistoj estas devigataj diri al siaj lernantoj.

Instruante la ŝtatanan moralon, la instruisto diros al lernantoj: "La parolo de niaj imperiestroj estas el sama origino, kiel tero kaj ĉielo. La imperiestraj leĝoj ne povas esti kritikataj, kiel la opinioj eldirataj de ordinaraj homoj." Kaj la edukistoj plenigas la kraniojn de siaj lernantoj per tiaj ideoj.

La registaro tute konscias la gravecon de l' instruo pri moralo kaj la lernlibroj estas verkitaj de speciala komisiono. "La imperiestro", "la granda japana imperiestro", "la devoj de la regatoj", "la patriotismo", "la nacio", jen la plej oftaj temoj. Oni parolas ankaŭ pri Vero, Bono, Belo, tiaj kiajn konceptas la burĝaj monarkistoj. La ekskursoj al historiaj monumentoj, la sportekzercoj ankaŭ utilas por disvastigi monarkistajn ideojn. La lernantoj staras laŭvice sur la stratoj, kiam dinastia familiano vizitas urbon. Oni asertas, ke nun la ekskursoj de lernantoj estas en Japanio efektive veraj militistaj manovroj. En la duagradaj lernejoj oni instruas la lernantojn pri pafarto kaj militistaj ekzercoj.

La materiala situacio de la instruistoj ne estas luksa. La unuagradaj lernejoj estas plenplenaj de lernantoj, meznombre po 60 lernantoj en unu klaso. En marto 1920 estis en Japanio 10 092 751 gelernantoj unuagradaj kaj nur 178 450 geinstruistoj (viroj 65,5% — virinoj 34,5%). La procentoj de lernejvizitado de gelernantoj atingas 98 en urboj, 99 en urbetoj kaj vilaĝoj.

La salajro por la diplomitaj instruistoj estas revizita en 1916 kaj varias monhelpon de 10 milionoj da jenoj al la popolinstruistoj, post kiam la japanaj instruistoj elmontris sian malkontenton. En la fino de la mondmilito la vivkosto estis en Japanio tiel alta, ke la instruistoj tre malfacile povis vivi. Oni kalkulis, ke por vivi dece oni bezonis 200 jenojn pomonate por kvinana familio. Sed la meznombra salajro instruista estis en 1918 iom pli ol 20 jenoj kaj per la monhelpo ŝtata ĝi nun ankoraŭ ne atingas 30 jenojn.

Estas signifoplene, ke la policistoj estas homoj la plej malamataj de japana popolo, kaj instruistoj la plej mizeraj. Fariĝi instruisto en Japanio estas la lasta vivrimedo post kiam oni fiaskis en ĉiuj aliaj profesioj.
nun de 40 ĝis 180 "jen"[4]) pomonate. En 1918 la registaro konsentis

La nacia buĝeto 1925—26 montras teruran politikan situacion en Japanio. Ĝi atingas 1 449 814 886 jenoj. El tiu sumo 426 746 430 estos elspezataj por armado kaj aliaj militelspezoj — kaj nur 98 954 098 jenoj por edukado. Oni elspezas 4 oble pli por detruado de civilizo ol por instruado.

1) Japana monunuo.

Spite de la preskaŭ ĝenerala malkontentiĝo de la geinstruistaro kaj ĝia ekstrema mizero, ĝis nun neniu korporacia postulmovado okazis en Japanio. La societoj, kluboj, asocioj ekzistantaj estas nur "amikaj rondoj" (amikaloj). La spionemo de la aŭtoritatuloj al la persona konduto de l'instruistoj kaj la enmiksiĝo de registaro ĉiufoje kiam la instruistoj provas sin organizi por la defendo kaj plibonigo de sia ekonomia situacio aŭ por sia politika laŭ ideologia libereco estas la kaŭzoj de la malnovtempa situacio de la instruistaj japanaj organizaĵoj.

Tamen klaskonscia organizaĵo estas ebla en Japanio, kondiĉe ke ĝi havu formon de la societo sekreta kaj kontraŭleĝa.

(El raportoj de M. Apletin kaj G. Tanin — en bulteno de Eduk.-Intern. julio 1925)

PRESEJO:
UNS-PRODUKTIVGENOSSENSCHAFT
LEIPZIG (GERMANIO)